# *Internaciaj laborbrigadistoj vizitas kubajn entreprenojn*

*Image not found or type unknown*

Havano, maj 1 (RHK) Membroj de la 18-a Internacia Brigado Unua de Majo de Volontula Laboro kaj Solidareco kun Kubo vizitis plurajn ?tatajn kaj sociajn instituciojn en Havano.

Alveninte al la kariba insulo, la brigadanoj el 16 landoj faris multnombrajn trairojn por ekscii pri la sekvoj de la ekonomia blokado trudita de la Blanka Domo al la kuba popolo.

Dum sia vizito ?i-merkrede, brigadanoj el Usono kaj Germanio alvenis al la Azumat Lo?istika Kompanio.

Tiu ?i organizo estis agnoskita kiel Nacia Avangardo pro "?iaj favoraj rezultoj en la plenumado de siaj misioj, malgra? la nuna situacio en la lando", diris Ulises Guilarte, ?enerala sekretario de la Centra Sindikato de Kubaj Laboristoj (CTC).

En ekskluziva intervjuo kun la informagentejo Prensa Latina, José R. Martínez, Direktoro de Informoj kaj Komunikadoj de la firmao, deklaris ke  ?i celas plibonigi kaj progresigi la efektivigon de siaj Strategiaj Evoluaj Programoj; Tial "?i tiu distingo estas pli ol atingo, ?i signifas devontigon kaj ?ancon."

La direktoroj de la institucio, kies socia celo estas surmerkatigi kaj distribui produktojn kaj provizojn al la tuta kuba sukerindustrio, partoprenis en alia renkonti?o kun eksterlandaj vizitantoj, kie ili klarigis ?ian funkciadon kaj respondis demandojn pri temoj kiel ?iaj internaj politikoj kaj salajra sistemo.

En la evento, Guilarte emfazis al la delegacio la bezonon de kunlaboro kaj subteno inter landoj, la rezistemon de la kuba popolo fronte al la plifortigo de ekonomiaj kontra?le?aj sankcioj truditaj de Usono, kaj ripetis la inviton partopreni en la Parado de la Majo en Kubo.

Aliaj delegacioj de la internaciisma brigado faris agadojn, kiuj inkluzivis vizitojn al aliaj kompanioj situantaj en tiu ?i ?efurbo, kiel la Kuba Internacia Asekura Kompanio S.A. kaj la Kompanio de Nutra?oj Prodal.

La pli ol 300 brigadanoj plilongigos sian restadon sur la kariba insulo ?is la 16-a de majo.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/381960-internaciaj-laborbrigadistoj-vizitas-kubajn-entreprenojn

**Radio Habana Cuba**